SESA ORDINARA DIMANĈO -14a de februaro 2010

FELIĈAJ ESTAS VI MALRIĈULOJ, VE AL VI RIĈULOJ –Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk. 6, 17. 20-26

En tiu tempo Jesuo malsupreniris kun la Dekdu, kaj staris sur ebena loko, kaj granda amaso de liaj disĉiploj, kaj granda nombro de la popolo el la tuta Judujo kaj Jerusalem, kaj el la marbordo de Tiro kaj Cidon, kiuj alvenis, por aŭskulti lin.

Kaj li levis siajn okulojn al siaj disĉiploj, kaj diris:
Feliĉaj estas vi malriĉuloj,
ĉar via estas la regno de Dio.
Feliĉaj estas vi, kiuj nun malsatas,
ĉar vi satiĝos.
Feliĉaj estas vi, kiuj nun ploras,
ĉar vi ridos.
Feliĉaj vi estas, kiam oni vin malamos kaj vin izolos kaj vin riproĉos, kaj elĵetos vian nomon kiel malbonan, pro la Filo de homo.
Ĝoju en tiu tago, kaj pro ĝojo saltu, ĉar jen via rekompenco estas granda en la ĉielo; ĉar tiel same faris iliaj patroj kontraŭ la profetoj.

Sed ve al vi riĉuloj!
ĉar vi jam ricevis vian konsolon.
Ve al vi satigitaj!
ĉar vi malsatos.
Ve al vi, kiuj nun ridas!
ĉar vi malĝojos kaj ploros.
Ve, kiam ĉiuj homoj parolos bone pri vi! ĉar tiel same faris iliaj patroj al la falsaj profetoj

Post la elekto de la Dekdu sur la monto – la monto indikas la lokon de la dia sfero, de la dia kondiĉo - la evangeliisto skribas ke "Jesuo malsupreniris kun ili, kun la Dekdu, kaj staris sur ebena loko, kaj tie alvenis granda amaso de liaj disĉiploj", kaj estas al la disĉiploj ke Jesuo turnas sian instruadon, la Surmontan Predikon.

En la Evangelioj ni trovas la surmontan predikon en la evangelio laŭ Sankta Mateo kaj en tiu laŭ Sankta Luko; la dirmaniero estas malsama, sed la mesaĝo estas tute sama. En Sankta Mateo la surmonta prediko estas invito al tiuj kiuj volas eniri en tiun feliĉon; en la Evangelio laŭ Sankta Luko, kontraŭe, ĝi estas konstato pri tiuj kiuj jam ĉion forlasis kaj Lin sekvis.

Tiam, skribas la evangeliisto, "Li levis siajn okulojn al siaj disĉiploj", tio estas grava afero. Jesuo ne estas sin turnanta al la homamaso, al la homaro, sed al tiuj kiuj ĉion forlasis kaj sekvis Lin. Kaj Jesuo diras "Feliĉaj"- feliĉaj signifas, senmezure kaj treege ĝojaj, "vi, la malriĉuloj", Li aludas la disĉiplojn, Jesuo ne estas gloranta la malriĉecon! La malriĉuloj estas malbonŝanculoj kaj estas tasko de la kristana komunumo forpreni ilin el ilia mizero.

Neniam en la Evangelio Jesuo deklaras ke la malriĉuloj estas ĝojaj homoj! Esti malriĉuloj estas negativaĵo kaj estas tasko de la Sinjoro tion eltranĉi el la terglobo danke al tiuj kiuj volos Lin helpi.Sed ĉi tie Li referencas al tiuj disĉiploj kiuj, kiel ni jam aŭdis ĉe la ĉapitro 5a, 11a versego, ĉion forlasis kaj Lin sekvis, do ili jam eniris en mizeran kondiĉon.

Nu, Jesuo certigas, "vin povrulojn", kiuj jam ĉion forlasis kaj min sekvis, vi estas feliĉaj ĉar via estas la regno de Dio". Regno de Dio ne indikas geografian vastecon, sed ĝi signifas ke Dio povas regi kiel reĝo, nome, la Patro prizorgas vin. Tiuj negativaj konsekvencoj kiujn la elekto de la malriĉeco kaj la sekvado de Jesuo povas okazigi estos mildigitaj kaj forigitaj de la fakto ke la Patro prizorgos vin.

Praktike la evangeliisto estas diranta: "vi, kiuj faris elekton favore al aliuloj, ne zorgu pri vi ĉar Dio prizorgos vin", jen kial ili estas feliĉaj.

Poste la evangeliisto ekzamenas la eventualajn negativaĵojn kiujn tiu elekto antaŭpostulas: la malsaton, la ploradon, la persekutadon. Nu, en ĉiu el tiu nagativaĵoj tiuj disĉiploj estas feliĉaj, ĝuste ĉar la Patro prizorgos ilin kaj se ili malsatos ili plene satiĝos, se ili ploros, ili poste ridos kaj eĉ kiam venos la persekutado ili scios ke la Patro ĉiam estos flanke de ili – la persekutado kompreneble pro la Filo de Homo.

Fakte Jesuo eĉ diras: "Ĝoju en tiu tago de persekutado, de sufero", ne pro masoĥismo, sed ĉar "jen via rekompenco estas granda en la ĉielo".

La ĉielo estas maniero por indiki Dion, nome, "Dio estas flanke de vi, Dio prizorgas vin". Kaj poste jen la grava deklaro de Jesuo: "ĉar tiel same faris iliaj patroj patroj". Strange Jesuo ne diras "niaj patroj", Jesuo distanciĝas de sia popolo, "iliaj patroj kontraŭ la profetoj". Jesuo estas komparanta la rolon de la disĉiplo al tiu de la profeto.

Kiu estas la profeto? Li estas kiu videbligas en sia vivo mem la nevideblan Dion. La elekto, la aliĝo al Lia mesaĝo transformas la disĉiplon en profeton. Do kiel oni ne komprenis kaj ne akceptis la profetojn, sed kiel ili estis persekutitaj, tiel same okazos al vi.

Poste ŝanĝiĝas la sinteno, sed Jesuo ĉi tie ne uzas la vorton "Malfeliĉoj". La greka dirmaniero ουαί Ouai referencas al la hebrea vorto Hði, kiu estas la funebra veo. Jesuo ne minacas, sed Jesuo jam ploras por ili kiel por mortintoj, kiel por kadavroj. Do, tiu ne estas minaco kiun Jesuo faras al iuj klasoj, sed Jesuo, dum la disĉiploj elektis la vivon ĉar ili sin dediĉas al aliuloj, li ploras sur tiuj kiuj pripensas nur sin mem kiel se ili jam estos mortintaj. Do ne temas pri minacoj sed pri ĝemadoj.

"Ve al vi " – do, ne "malfeliĉoj"- "riĉuloj", nome tiuj kiuj kaŭzas la mizeron, "Ve al vi satigitaj!", tiuj kiuj kaŭzas malsaton, "Ve al vi, kiuj nun ridas!", nome, ve al tiuj kiuj kaŭzis suferon. Kaj, konklude, Jesuo diras, "Ve, kiam ĉiuj homoj parolos bone pri vi!"

La regulo por ekkoni la aŭtentikecon de la profeto estas lia rilato kun la vivsistemo. Se la vivsistemo vin kuraĝigas, vin laŭdas, vin aplaŭdas, tio signifas ke vi perfidis la mesaĝon de Jesuo. Male, kiam la regadsistemo, tiu kiu regas la medion, vin kontraŭstaras, vin persekutas, vin kalumnias, tiam vi ĝoju, ĉar vi certas ke vi estas je la flanko de la Sinjoro!

Fakte, Jesuo finas sian paroladon jene: "Tiel same faris iliaj patroj"- denove Jesuo distanciĝas- "al la falsaj profetoj". Do kiam la medio aplaŭdas ni estas certaj ke tiu homo ne estas iu sendito, sed li estas perfidanto de la mesaĝo de Jesuo, li estas ĝuste falsa profeto. Dum la profeto videbligas la

bildon pri la nevidebla Dio, la falsa profeto estas tiu kiu “blankigas iliajn misfarojn”- por uzi la dirmanieron de la profetoj- ili stukas la misfarojn de la registaro.